# *La kooperativoj: malnovaj laborformoj sed en novaj agadkampoj*



Kiel  parto de la nuna strategio aktualigi la kuban sociekonomian modelon, la lasta kongreso de la partio aprobis la gvidliniojn de la ekonomia kaj socia politiko kiu jam eniras pli profundan etapon en la ser?ado de pli produktiva kaj prospera lando.

La kooperativoj en Kubo jam de multaj jaroj pruvi?is kiel efika labormaniero uzata preska? ekskluzive en la agrikulturo, sed nun pluraj agadoj en la servoj kaj produktado anka? aplikas ?in kun pozitivaj rezultoj.

La? informoj de Grisel Tristá Arbesú, estrino de la areo por pliperfektigi tiun agadon kadre de la konstanta laborkomisiono kiu gvidas la starigon de la strategiaj gvidlinioj, nuntempe funkcias en la insulo 246 ne agrikulturaj kooperativoj, plus aliaj kiuj balda? eklaboros kaj entute estos 498 ?is nun jam rajtigitaj.

Tiuj kooperativoj transiras diversajn etapojn anta? ol esti enskribitaj oficiale en la merkata registrosistemo.

?i raportis ke la kooperativoj jam laboras en la sektoroj de komerco, gastronomio kaj servoj; transportado de pasa?eroj, kargoj kaj asociitaj servoj; konstruado, industrio, nutra?oj, energio kaj librotenaj servoj.

?i klarigis ke kiel preferataj unuoj kies agado ne estas ?tata, la kooperativoj pli favorataj estas en sektoroj pli proksimaj al la lo?antaro, kiuj bezonas kaj uzas iliajn servojn kaj tiamaniere, la ?tato konsideros ilin ene de la sistemo de planado de la tutlanda ekonomio.

La kooperativoj posedas juran personecon kaj ilian agadon regas la oferto-mendo, ili estas kolektiva proprieto kaj ne povas esti venditaj nek transdonitaj.

La funkciulino informis ke ankora? estas pluraj obstakloj kaj malnovaj praktikoj kiuj ne estas bone aplikataj, interalie, miksado de funkcioj kaj misuzo de kompetentecoj.

?i laste emfazis ke la solvo de multaj problemoj estas en la bona mastrumado de la tuta eksperimenta procezo nun okazanta kaj kun la interveno de la organismoj kaj la koncerna komisiono kiu prizorgas la starigon de tiuj novaj produktivaj formoj celantaj anta?enigi la kuban ekonomion.

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/23562-la-kooperativoj-malnovaj-laborformoj-sed-en-novaj-agadkampoj](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/23562-la-kooperativoj-malnovaj-laborformoj-sed-en-novaj-agadkampoj)

**Radio Habana Cuba**